# Jarraporto IEA 2021

*Raportas: Marc Vanden Bempt*

En la 22-a de januaro 2021 okazis la Ĝenerala Kunveno per kiu IEA estis fondita. La deklarado en la retejo de griffie.be okazis en la 23/1/2021. Rapide sekvis la aprobo kaj komenco de jura personeco. En la **25-a de januaro 2021** la asocio Internacia Esperanto-Arkivo estis oficiale fondita kaj rekonita de la belga ŝtato.

La tri fondintoj kaj la administrantaro estas Bert Boon (Tienen), Roland Rotsaert (Brugge) kaj Marc Vanden Bempt (Winksele).

## Administraj formalaĵoj

Oficiala jarkunsido 24.5.2021 (kun raporto).

La administrado estas startita:

- librotenado startita
- formularo por kostokalkulo kreita
- bankkonto malfermita 5/2
- propono por privatecdeklaro farita 25/1, aprobita 12/2
- dokumentujo kreita en Google Drive por la administrantoj. Tiel jam multaj dokumentoj estas alireblaj de ili ĉiuj. Aliaj restas

provizore en aparta komputilo, i.a. la katalogoj de revuoj, libroj, k.a. (en ĉiu momento eblas peti kopion de ili)

- administrado de impostoj: IEA estas AVI-pagideva ("BTW-plichtig"), tial formularo 604C estis sendita por peti aktivigon. Ni estas "libera je AVI" ĝis vendosumo ("omzet") de 25.000€. Ni jes devas sendi liston de klientoj kun aĉetoj de pli ol 250€ en la jaro (se ne estas tiaj: sendi malplenan liston ne necesas)
- deklaro pri finaj favoratoj ("uiteindelijke begunstigden") laŭ la leĝo pri aspc farita en la koncerna retejo (majo)

## La kolekto de IEA: stato

Komence de 2021 la kolekto konsistis el

- 7.520 plenaj revujaroj (de 960 titoloj)
- 4.907 neplenaj revujaroj, de tiuj kaj aldonaj 407 titoloj
- miloj da duoblaj revunumeroj (ne ekzakte nombrata)
- 13.175 libroj, broŝuroj kaj dokumentaroj (vidu ĉi-sube)
- da ili estas 10.490 duoblaĵoj, de 5.210 malsamaj titoloj.

La kolektado kaj enkatalogigado daŭre pluiris tra la jaro. Ekzemple komence de aprilo la nombro de libroj jam atingis 13.500.

Fine de 2021 la kolekto konsistis el

- 7.811 plenaj revujaroj (de 993 titoloj)
- 5.010 neplenaj revujaroj (de aldonaj 441 titoloj)
- miloj da duoblaj revunumeroj (ne ekzakte nombrata) el 4.892 revujaroj
- 14.245 libroj, broŝuroj kaj (el tiu totalo) 552 dokumentaroj.
- da ili 11.739 duoblaĵoj (de 4.894 malsamaj titoloj).



La menciitaj “dokumentaroj” estas kovertoj en kiuj ni arigas plurajn malgrandajn dokumentojn. Ekzemple invitiloj, informiloj, raportoj kaj simile pri kunvenoj, aranĝoj kaj diversaj eventoj malgrandaj estas grupigitaj en koverto laŭ jaro. Same la dokumentoj pri serioj da kongresoj (belgaj, francaj, germanaj, japanaj, UK, IFEF kaj pluraj aliaj) estas arigitaj en po koverto por ĉiu okazaĵo.
Tiujn kovertojn ni enkatalogigas kaj stokas en serioj, inter la aliaj serioj kaj do ne en aparta grupo.

Aliflanke ni jes intencas komenci apartan grupon de dosieroj. Atendas ja ordigadon cento da dosieroj el la antaŭa kolekto de Kortrijk kaj kelkaj aliaj (kreado de Zamenhofstrato en Beuvrages, Esperanto 3000, IKEF,…).
Ni poste prikonsideros ĉu indas translokigi (kaj do renumerigi) la dokumentujojn al tiu grupo.

## La kolekto de IEA: kvalito

La kvalito de la kolekto plialtiĝas kaj daŭre estas plialtigita: senacidaj skatoloj kaj dokumentujoj anstataŭ la antaŭaj. Samtempe ni forigas plastaĵojn kaj vinktojn. Por la duoblaĵoj ni reuzas la antaŭajn kartonajn ujojn, la ideo ja estas ke tiuj ne restu ĉe ni dum jardekoj.
La laboro estas komencita sed pluiras. Fine de 2021 interalie ĉiuj revuoj de A ĝis I jam troviĝas en la novaj skatoloj.



Ankaŭ la malvinktado pludaŭras, same kiel indikado de la kvalitoj en la librokatalogo. Bert kaj Vivienne Boon-Tudts helpis kiel volontuloj.

## La kolekto de IEA: transprenoj kaj interŝanĝoj

Sekvas kelkaj el la fontoj de tiu kresko kaj pri interŝanĝoj k.s.

La integriĝo de la kolekto el Kortrijk en la kolekto de IEA estas grandparte farita. Aldonaj skatoloj el Kortrijk estis prenitaj en augusto kaj oktobro, je entute ĉirkaŭ 1.400 kg. La granda plimulto estas duoblaĵoj, tamen ni trovis tie ankaŭ kelkajn novajn revuojn, eĉ novajn titolojn. Restas 500kg por 2022 kiel lasta aldonaĵo.

Unua listeto estis kreita de revuoj kies novajn eldonaĵojn senpage ricevadis la biblioteko de Kortrijk. Surbaze de tiu listo kaj de aldona listo de plu aperadantaj revuotitoloj, ni kontaktis la eldonantojn por peti sendi ekzemplerojn malnovajn kaj novajn al la Arkivo. Bert Boon alskribis sepdekon da eldonantojn, ankaŭ por aperigi artikolon pri IEA, en la dua duono de aprilo. Estis kelkaj pozitivaj reagoj.
Tra la jaro pluraj promesis sendi novaperintajn revuojn (Prago, Dio Benu, Starto, Polnicky,...) sed nur kelkaj eksendadis (Novaĵoj tamtamas, Monato, La monde de l’Esperanto, Esperanto, Kancerkliniko, ENA). Ni nepre plu aktivu je tiu tereno.

Jam en januaro ni transprenis la plenan kolekton de Jean Dietrich (6.6.1929-2.11.2020) el Beuvrages, kiu mem antaŭe transprenis plurajn kolektojn de membroj el la loka grupo de Valenciennes: libroj (238 originaloj + 1.132 duoblaĵoj), revuoj (4 skatoloj, ebligis kompletigi 26 revujarojn



+ multaj duoblaĵoj), dosieroj pri eventoj (ĉ. 1m bretolongo), kaj aliaj (ekz. pri realigado de Zamenhofstrato).

En junio ni ricevis kvarskatolan kolekton de Marcel De Grave el Comines (Komen), pere de Piet Glorieux kaj Jean-Claude Thumerelle: 13 novaj kaj 89 duoblaj libroj kaj 5 plastaj diskoj.

En junio 2021 ni ricevis kio post interveno de la gefiloj restis de la kolekto de Lucas Laga el Gullegem: 3 novaj kaj 18 duoblaj libroj, 8 novaj kaj 10 duoblaj revunumeroj, aro da dokumentoj (kartoj, fotoj, leteroj, 2 kalendaroj, stampo). Parto estos metita en aparta dosiero.

Estas kontaktoj kun pluraj aliaj personoj kaj instancoj, kies kolekton proponas transpreni kaj konservadi IEA. Ni ne listigos ilin ĉi tie pro kialoj de privateco, sed en 2022 pliprofundigos la kontaktojn.

En februaro renoviĝis la antaŭaj kontaktoj (Bert) pri interŝanĝoj kaj aĉetoj kun la Esperanto-muzeo en Vieno. Tio rezultis en konkreta petolisto nia de libroj (sendita 4/3 & 3/4, 517 libroj) kaj inverse pretigitaj 4 skatoloj por ili (preta 20/3, 353 libroj + revuo Eŭropa dokumentaro). Aldoniĝis dua listo, pretigita 11/5. Entute ĉ. 1.100 libroj de ni kontraŭ pli ol 500 de ili + 1.200 revunumeroj. Feliĉe Vieno pagis la sendokostojn ambaŭdirekten, pro kio ni dankas.
Per tiu interŝanĝo aldoniĝis en la katalogoj: 80 revujaroj plenigitaj (14 novaj titoloj) + aldonaj 87 neplenaj (7 novaj titoloj) revujaroj, 516 librotitoloj (+ kelkaj duoblaj libroj/revuoj).
En julio nova aro da revunumeroj estis apartigita laŭ peto de Vieno el 2019, entute 484 numeroj. Tiujn ni sendis la 8an de oktobro, Vieno sendis en decembro similan kvanton da de ni petitaj revuoj (kvankam enestis, pro miskompreno, ankaŭ duoblaĵoj). Ili fine de 2021 jam estis en la katalogo.

Prava rimarko el Vieno estas ke la kvalito de la senditaj libroj kaj revuoj ne ĉiam estas tre bona. La kialo estas ke en la biblioteko de Kortrijk ĉiu ero estis traktita kiel pruntebla libro: bindita (kio kaŭzas

difektojn), engluita plastaĵo kun pruntoslipo ktp. Tio estas heredaĵo el la pasinto kaj do nemalfarigebla.

## La kolekto de IEA: donacoj kaj vendoj

La duoblaĵoj estas proponataj por vendado. La totala vendoprezo



proponata de la 11.739 libroj (stato fine de 2021) estas 28.534€, do mezume malpli ol po 2,50€. En 2021 ni malgraŭ manko de reklamo vendis jam je 269€, ankaŭ tio iom plifortigas la financan bazon de IEA kaj do ege bonvenas.
Petu ankaŭ vi la aktualan proponliston de libroj kaj binditaj revujaroj. Eblas malmultkoste krei vian propran Esperanto-kolekton!

Ni en marto, post aliaj donacoj antaŭaj, lastfoje donacis al la Antverpena kolekto EHC, el la duoblaĵoj de Kortrijk, 325 librojn. Ĉar la kolekto Vanbiervliet tiel estas fintraktita por EHC, ĝi ekde nun ne plu havas specialan statuson en IEA. Eblas interŝanĝoj aŭ aĉetoj el niaj duoblaĵoj, sed ne  plu donace. En decembro tamen pluaj 4 revunumeroj estis donacitaj.

## Arkivejo

En februaro 2020 ni postponis la antaŭajn planojn pri Slovakio. La kolekto ja provizore povas resti en Belgio. Tio bedaŭrinde estas en privata domo, kio ne estas senriska konsiderante pli malproksiman futuron kaj do nepre provizora solvo. Tiel decido pri definitiva ejo iĝis iom malpli urĝa, ĝi tamen restas unu el la gravaj agadpunktoj.

Ni tra la jaro esploris diversajn konkretajn eblecojn, sed ili evidentiĝis ne taŭgaj. Ekzemple eblis lui sufiĉe grandan spacon ĉe Klappei en Antverpeno, je dudek metroj de la FEL-centro (Flandra Esperanto-Ligo), sed tio estus en keloj ne bonstataj, kie la risko je

ŝimaĵo ne malekzistas. En la sama ĉirkaŭaĵo estis eksa kinejo De National, pri kiu estis vendoplanoj, tio tamen fine ne okazis.

Plej grava prioritato estas nun, krom dissciigo pri la ekesto de IEA, la trovado de la financaj rimedoj necesaj por la propra arkivejo. Donacantoj, kun-investantoj, amikoj de IEA estas ege bonvenaj!


IEA prioritate serĉas ejon en Antverpeno proksime al aŭ eĉ apud la centro de FEL. Sed alia ejo en la lando, proksima al sufiĉe grava stacidomo, ankaŭ taŭgas.

Krom la ejo kie konserviĝos la baza kolekto, ni povas deponi kolektojn de (po unu) duoblaĵoj en aliaj ejoj. La kolekto mem restas propraĵo de IEA, sed la administrado kaj stokado, kompreneble ankaŭ utiligado, estas tiam en la mano de alia respondeculo.
Tiel ni havis kontaktojn kun diversaj personoj, en Belgio (Corbion) kaj alilande (Slovakio, Kroatio, Germanio), sed provizore ne estas konkretaj interkonsentoj. Precipe la loko en Corbion taŭgus (temas tie pri eble 40 m², biblioteko en kreata Esperanto-centro).

## Informado

La administrantoj decidis pri la konstantaj informiloj: jarraporto (pdf/papero) + retpaĝoj. Eblas porokazaj informiloj (ekz. retmesaĝoj), sed ni ne havu propran revuon.

Paĝo pri IEA estas kreita en Vikipedio (Roland, 28/2), samtempe la paĝo pri la eksa Fondaĵo Vanbiervliet estas (definitive) aktualigita.




Bert laboradas pri aperigado de artikoloj pri IEA en diversaj revuoj. Rezultoj jam estas pluraj:

Horizon-Taal (dua artikolo aperis en jan/feb 2021, kun ĉi-foje kelkaj konkretaj reagoj), Esperanto, Orienta revuo, Ondo de Esperanto,...

En la 19-a kaj 22-a de julio estis prezentoj po unuhoraj de IEA en la 2-a Virtuala Kongreso de UEA. La unua kun 20-o da partoprenantoj teknike fiaskis, la dua kun sama nombro post kvaronhora problemaro bone sukcesis. Tuja rezulto estis aldona ora amiko kaj propono pri revuoj el Toulouse. Tiu lasta ekkonkretiĝis fine de 2021.

Konciza informo pri IEA troviĝas en inventaro archiefpunt.be (15/8).

La retejo de IEA estas kreita. En ĝi troviĝas paĝo "subteno" kaj formularo por reagoj kaj proponoj estis aldonita fine de februaro. Por tiu lasta ni bezonis asiston kiun ni senpage ricevis de profesiulo. Ankaŭ la paĝo "historio" estas kreita. Daŭre aktualigata.

Fine de aprilo la "katalogo"-paĝo en la retejo iĝis "kolekto": ne nur la katalogo, sed ankaŭ la servoj kiujn ni proponas. Unua rezulto venis jam fine de aprilo: aĉcetanto de duoblaj libroj sin anoncis.

Ni daŭre ŝatus transpreni le retnomon arkivo.eu, provizore uzas nur iespa.eu. Tiu retnomo arkivo.eu estas menciita en statutoj kaj en Kruispuntdatabank, do statutmodifo necesas por transiri al iespa.eu, tio kostas 135€. Provizore ni lasas la situacion kiel ĝi estas.

## Financoj

En februaro ni ellaboris financajn subteneblecojn: briko, amiko, mecenato, aliaj.

La unuaj Amikoj, fakte amiko kaj amikino, sin anoncis en la 27/2: Bert kaj Vivienne. Ankaŭ jam en februaro okazis la unua vendado de duoblaĵoj.

La definitivaj prezoj por Amikoj, deciditaj en la 27/2 de ĉiuj administrantoj, estas la jenaj: roza amiko 5€, lazura amiko 15, ora amiko 45, ebura amiko 100. Amiko ricevas leteron, jarraporton kaj koncernan brikon kun nomo.

Da brikoj eblas ricevi 1 por 7€, 3 por 18, 6 por 33, 10 por 50.

Ankaŭ Mecenato ricevas leteron, jarraporton kaj brikon verdan kun nomo. Ili estas menciitaj en la retejo de IEA.



Parto de la duoblaj libroj

La administrantoj en marto decidis pri kriterioj por fiksi prezojn de duoblaj libroj kaj revuoj: 0,02€/paĝo, iom pli por grandformataj (+ 10-20%) aŭ por malnovaj eldonitaj en 1887-1918 (+ 50%).

En junio ili decidis ankaŭ pri vendado de binditaj revukolektoj: bindite 0,6€/numero (antaŭ 1918: 1€) rondigita al plenaj eŭroj, nebindite 0,5€. Tre etaj revuoj povas malpli kosti, valoraj pli.

Subvencio estis petita de la Institucio Hodler de UEA (komence de februaro) por du projektoj: nova ejo + transpreno biblioteko Hodler (anstataŭas antaŭan kontakton kun Corsetti/UEA), alveno konfirmita 10/2. Fine UEA bedaŭrinde decidis negative.

## Esploroj, uzado de la kolekto

Tra la jaro la kolekto de IEA estas uzata por diversaj esploroj. Ni mencias nur kelkajn ekzemplojn.

- artikolo pri/de Elsschot trovita por Bert (kaj Elsschot-genootschap) en Flandra E-isto okt.1931, kopio liverita
- tra la jaro kontaktoj kun Petro De Smedt, ne nur pri la Fundamento (nia speciala eldono 1906, jam priparolita en 2020), sed ankau pri la Unua libro (rusa kaj pola versioj),... TIujn li uzas en siaj studoj.
- Bert skanos la poŝtmarko- kaj stampo-kolektojn por Elda Doerfler, kiu uzos tion por aperonta katalogo.

- Kelkaj stampoj iris al ENA kiu nun serĉas informojn pri ili. Spuremuloj helpu al bert.boon@skynet.be



- oktobro: informpeto el Azia pri 4a Eŭropa Kongreso respondita
- respondkupono 50ct el "La Servaro" de UEA 1932 sendita al Bert Boon (8/8), li havis nur 30ct kaj 1fr.
- Superrigardo pri arkivo Lucas Laga sendita, por Vikiflandrio (okt), same pri Hubert Boving (9/12)
- Ekzemplero (duobla) de la Sankta Biblio 1931 donacita al Guido Ricci. Poste ankaŭ informoj pri aspc ĝenerale
- En junio ni proponis esploron pri Esperanto al genealoga grupo (West-Vlaanderen-genealogie@groups.io), kun sugesto pri IEA

La bibliotekoj de revuoj (belgaj + gravaj internaciaj) kaj libroj (emfazo sur lingvistiko kaj interlingvistiko) de FEL estas denove starigita. La plimulto venas el la kolekto de IEA (ambaŭ partoj). Ankau estas kreita propraj katalogoj pri tio: sekvu la ligon "Biblioteko" en esperanto.be/fel.

Varbu ankaŭ vi subtenantojn por IEA:

*Amiko – Briko – Mecenato – Investanto – Volontulo - Aĉetanto*

Detalajn informojn kaj anoncilon vi trovos en la retejo

*arkivo.eu*